„Paĉjo, nur iomete suprenveni li volus, tute senmove li sidos." (La „mi" konscio ne jam vekiĝis.) Paĉjo kompreneble ne povas kontraŭstari. „Do suprengrimpu." Dum kelkaj minutoj silentego regas. „Paĉjo, tiun libron kun la verda stelo li volus legi." Ekĝojo. „Jen, legu." — „Kaj nun li volus skribi en ĝin per la ruĝa krajono." Indigno. La patro alŝovas la tre ete pezan inksorbilon; sed Herĉjo pro interna malkontenteco uzas ĝin kvazaŭ ĝi estus forĝmartelo. dum lia rigardo sopirege vagadas de unu objekto al alia, ĝis kiam ĝi fiksiĝas je blanka kolombeto, kiu per etenditaj flugiloj restadigas forflugemajn folietojn. „Paĉjo, la kolombeton li povas rigardi proksime, ĉu jes? Kaj tuŝi — nur iomete — tute delikate!" La insista peto efikas tiel, ke la kolombeto estas alproksimigita; jam ĝi turniĝos antaŭ la ĝojbrilaj okuloj de la knabeto. Ravite li ĝin rigardas kaj delikatmane karesas. „Ĉu vi nun estas kontenta?" demandas la patro. Ho, naiveco! „Havi!" respondsonas energia, vire postulema ekkrio. Al la patrino proksime observanta tio signalas: Jen danĝero! Ŝi alvenas, ĉirkaŭprenas la akiremulon kaj transportas lin aliloken. Forkisante la larmojn de lia vizaĝeto ŝi konsolas lin per karesaj vortoj. Krome ŝi pensas: „Panjo komprenas ja vian doloron kaj ŝi suferas kun vi. Tamen ŝi dezirus ĉiam fortiri vin en danĝeriga momento per sia amintenca mano. Vi ekscitiĝus, vi plorus, sed al vi restus io valora en la vivo: la infana sopiro.

Dumnokta migrado

(de prof. dro. Josef Blaas; esp. dro. Leo Blaas.)

„Nokto al neniu hom' amiko", jen la proverbo; sed nur por la vidantaj ĝi taŭgas; por la blinduloj preskaŭ la inverso estas vera. Tago al neniu blindulo amiko! Ĉar li ja malhavas ĝin, enviante pro ĝi ĉiujn aliajn. Amiko lia estas la nokto, nepre ĝi, kiu lin ĉirkaŭadas ĉiamdaŭre. Duoble malfeliĉa li estus, kun tiu ne amikiĝante.

Traurba irado dum tago por blindulo ĉiam estas riskaĵo, eĉ gvidata per amiko. Ĉar gvidanto eĉ plej favorema kaj atenta nur malfacile povas pense penetri la staton de blindulo, kaj observi ĉian malhelpaĵon ĉu egan ĉu etan, kiu kontraŭstaras la blindulon. Tro malfrue la gvidanto ekatentas sur la pavimo la ŝtupon, — la ekvido al ĝi nekonscie funkciigas la meĥanismon de l' movado — tro malfrue ambaŭ rimarkas, ke la blindulo ne tiel feliĉe kapablas — kiel vidanto — ire eviti la malfacilaĵojn — homojn venantajn renkonte al li — elstaraĵojn survojajn ktp., kiujn lasas flanke la vidanto aŭtomate, sed preter kiuj la blindulo zorgeme estu gvidata. La baraĵoj mem ĝenerale ankaŭ ignoras la blindulon. Jen virinoj kaj lanternfostoj, ili estas aĵoj, ne sciantaj lasi lokon; tutkrome veturiloj, biciklistoj, ĉevaldirektistoj kaj tramveturiloj! Dumtage al tiaj malamikoj danĝeraj aliĝas bruado de l' preterrapideganta popolamaso, kiu premegas serĉante, kriante. Krom tio signaloj eĉ por vidantoj al aŭdsento adaptigaj, jen kio pleje senefikigas la eblon, orienti sin laŭ akustikaĵoj decidaj ankaŭ por blindulo.

Tial mi laŭeble evitas traurban promenon dum tago; sed dumnokta migrado tra la konataj kvartaloj plezurigas min, denove estiĝas sento de l' suvereneco, kiun mi havis iam vidanto, sola mi estas

sur la strato, kaj estro; kia ĝusento! Nur kiu perdinte la estrecon super si mem dependas ĉiuflanke kaj povas entrepreni nenion sen kunhelpo de ekstere, tiu eble komprenos la liberigan ĝusenton, eniĝantan en blindulon, se almenaŭ parteto de lia libereco al li estas redonacita Ĉu vi komprenas mian diron, ke enestas en tiaj dumnoktaj migradoj tra de urbo mallaŭtaj stratoj grandega ĉarmo?

El la tempo antaŭ mia blindiĝo mi konservis klaran imagajon de la urbo, de ĝia stratoro kaj ties lokiĝo rilata. Mi konas en multaj stratoj certajn elstarajojn, anguletojn kaj randojn. Plej ofte mi scias, kie la pavimo komenciĝas per alta ŝtupo, kie ĝi finiĝas ktp. Eĉ la lanternfostoj cetere malamikaj, al kiuj mi ankoraŭ vidanta ekpuŝiĝis, kiam mi enpensiĝinta vagadis, nun estiĝas gviduloj amikaj, almenaŭ parte.

Provizita je tiaj spertoj mi povas riski sen gvidanto dumnoktan migradon tra stratoj de l' urbo, ĉar ja mankas ĉiu danĝera barajo, homoj, bestoj, maŝinoj. La ĉarmon de tia migrado silentema mi jam antaŭsentis en pli fruaj jaroj, hejmenirante post noktomezo de kunveno, klubo aŭ studenta drinkado. Ili trankvile kuŝadas, jen supre malantaŭ fenestroj mallumaj, ĉiuj la mortemuloj, kiuj bruadis, rapidis ageme, la stratoj pli longaj ŝajnis kaj pli larĝaj, sur la pavimo miaj paŝoj ehetis, kaj eĉ la lanternfostoj — nur kelkaj ankoraŭ lumantaj — ŝajnis ekdormontaj. Ofte mi paŝe ekhaltis, lasante efiki sur mian animstaton tiuj sentemajoj, dum miaj pensoj migradis de l' tempo al eterneco.

Depost la noktiĝo ĉirkaŭ mi, nur nun estas pliege malfremdaj ankoraŭ tiaj bildoj de l' animo, precipe, se la reala mondo harmonias kun ili, do dum la nokto. Daŭrigota.

18a Universala Kongreso de Esperanto

Edinburgh 31. julio — 7. aŭgusto 1926.

41 Cluny Drive.

Ĉu nia junularo fotografu?

La lernejo kaj ĝiaj taskoj ne plenokupas nian junularon, nek ĝiajn tempon, nek interesojn. Kaj tio estas bona! Kie estus alie „la juneco“?

La demando nur estas, kien la troon? Prudentaj gepatroj kaj konsilantoj ĝustatempe zorgeme tion pripensos kaj ne atendos, sur kiujn devojojn ekzalto kaj kreemo gvidos. Kaj, se iel ebligeble, prudentulo ĝoje kaptos la fotografadon; problemsolvo ne superebla!

Neniam estos necesa trudo por efektivigi tiun ĉi ideon. La permeso por fotografi ĉiam estos rekompenco!

Okupo, kiu igas tiom da ĝojo kaj plezuro, forgesigas tute la pedagogian tendencon. Kaj tamen la eduka valoro estas ne neigeble granda. Antaŭ ĉio la celo mem pelas la junajn homojn en la naturon. Ne nur je sunbrilo, ankaŭ je duba vetero la juna neprofesiulo trovas okazon kaj instigon praktiki sian arton. Kaj la praktikado de ia arto kaŭzas mem rekompencon.

Antaŭe ekskursado ja nur estis ĉirkaŭvojo tra refreŝejoj, kiu fine, kaŭzinte nur trolaciĝon, kondukis hejmen. Nun ne nur instigas celo, sed la vojo mem kun ĉio bela kaj interesa, kion la naturo prezentas. Anstataŭ trolaciĝo, kiu fine povas malpliigi la ĝuon, instigas nun la sereniga espero, revidi en mem fotografita bildo la lokojn nin ĝojigintajn anstataŭ en aĉetita vidajkarto. Tiu ĉi pro alia animstato, percepto kaj lumo prezentas ion alian ol kion ni vidis. Kompreneble ankaŭ ni devas lerni, montri en bildo tion, kio faris speciale impreson al ni.

Sed tio estas ĝojiga lernado kaj la sukceso honeste meritita rekompenco.

Kaj, kion ni ĉiokaze lernas senpene, valoras por la vivo: Ni lernas r i g a r d i kaj — se iu talento ekzistas por tio - r i g a r d i a r t i s t e.

Vasta kampo, kiu devis esti tre malzorgata en la lernejo, malfermiĝas al ni: La kompreno pri artaj valoroj en desegnado kaj pentrado.

Kiel ĉio memakirita tiu ĉi laboro havigas al ni ĝuon kaj kontentiĝon kaj forgesigas la penon: Ni ekamas ĝin.

La sukceso poste kondukas pluen, ekzistas nek tedo nek halto. Ni ja vidas grizharajn virojn praktikantajn neprofesie depost ilia junaĝo la amatan sporton kun la sama kaj ofte eĉ pli grandiĝinta fervoro. Kaj, se ia situo postulas kelktempan paŭzadon, ĉiu denove volonte revenis tuj, kiam la cirkonstancoj tion permesis.

Se ankaŭ je la praktikokomenco de nemetiista fotografado ofte ne estis konsiderata tio, tamen la scipovo de la tekniko, kiu en la junaĝo estas ellernebla per malmulte da pacienco, havigis al multaj pli poste en ilia metio grandajn servojn.

Sur kiu agadkampo memfotografita bildo ne bonege estas uzebla?

Kiu profesiulo povas facile rezigni je ĝi?

Krom tio la kostoj tute ne estas supermezuraj. Certe la unuaj aĉetoj kaŭzas iomete pli grandan elspezon, sed tute ne tiom grandan kiel la neaferanoj eble supozas. Certe estas konsiderinde, ke oni aĉetu la aparaton kaj materialojn nur ĉe fidindaj firmoj. La ŝparo okaze de la aĉeto ĉe uzitaĵisto kaj nefakulo facile povas detrui ĉiun ĝojon.

Ke oni je la nunaj malagrablaj financaj cirkonstancoj devas ŝpari ankaŭ je la uzo de la materialo, estas en la intereso de la afero ja nur salutinde. Per tio estas metita baro al senpripensa lumkaptado kaj la necesa ŝparo kaŭzas mem pli zorgeman elekton kaj pli atentan traktadon de la fotografaĵoj kaj edukas al pli bona rezultigo.

Ĉar en tio kuŝas la granda pedagogia valoro de la eksterprofesia fotografado por nia junularo.

Ĝi kreas agadon, kiu mem ĝojigas kaj kiu donas ĝian rekompencon mem.

La ĝojo pri la sukceso estas la fiero pri la propra valorago.

Laŭ „Allg. Bergsteiger Zeitung — Wien“
verk. H. Steiner.

La etika graveco de l' Sporto.

Laŭ artikolo de Oberbaŭrat inĝ. Rud. Bergkraŭt en Neue Freie Presse No 21.812.

La interrilatoj inter korpo kaj animo permesas al ni la variigon de l' ĉiam citita proverbo, ke en sana korpo estas sana ankaŭ la animo. Ĉar korpa bonfarto refreŝigas ne nur la spiriton kaj idealigas ĝin, sed ĝi kreas ankaŭ statojn kaj sentimentojn koncernantajn la animon.

Rilate sporton oni mencias kaj akcentas bedaŭre tro ofte la edukadon kaj evoluon sole de la korpo. Kaj precipe ĉi tiu flanko de l' sporto, kvankam ne senpere sin prezentanta, estas samvalora kiel higieno kaj ĝi estas ĉiuokaze restanta preferaĵo. Nur ambaŭ kune efektivigas la veran kapablecon de l' junularo.

Ĉar moraleco kaj bonedukiteco, honesteco kaj malkaŝemo kun ĉiuj atributoj de bona karaktero estas postulataj kaj atendataj de sportuloj. Ili estas kondiĉoj por sukcesplena klopodo pro atingo de eminentaj korpaj agoj. Kiu neniam estis sportulo — ĉi tie estas konsiderata laŭ ideala senco la laŭsistema, alkutimigita kaj pli kaj pli intense celkonscia flegado de korpaj ekzercoj — tiu ne konas la rezignojn, propravolajn malhavojn kaj ĉiuspecajn danĝerojn, kiujn sportulo povas sperti.

Firma volo, energio, persisto kaj obstino antaŭ atingota celo, disciplino kaj sinregado, veremo kaj modereco, sed ankaŭ kuraĝo (ne aŭdaco) kaj pripensemo (ne singardo) estas la plej noblaj ecoj, kiuj distingas ĉiam la sportulon. Ili estas karakteraj ecoj postuleblaj kaj evolueblaj.

Relative nur malmultaj homoj estas laŭnature tiel senkapablaj, ke ili ne povus elekti tiun aŭ alian por ilia korpo taŭgan sporton. Tiurilate ni devas ofte miri pri la evoluo de diversaj sportherooj post komenca mallerteco kaj senhelpeco, aŭdante, kiajn antaŭe ne supozitajn rekordojn ili atingis.

Ĉi tiu efiko de sporto al morala eduko kaj perfektiĝo, kiel ankaŭ altigo de valoraj internaj ecoj de l' animo kaj

karaktero donas al la sporto pli altgradan gravecon, ol kredigas ĝenerale la akcento de ĝiaj higienaj preferoj.

Ĉar la samtempa sinsubmeto sub la firmajn leĝojn de sporto, celanta finfine nur konkuron pro prijuĝo de rekordoj, postulas ties aspiradon per honestaj rimedoj en nobla kaj estiminda formo kontraŭ ĉiu homo, speciale kontraŭ la kunkonkuranto. Forto kaj supereco neniam rajtigas malrespekti la malplifortulon. En ĉiuj fazoj de l' malfacila prepariĝo oni devas lerni sinregadon. Ĝentileco, kavalireco estas la atributoj de ĝusta sporta batalo.

Batalo! Ne volonte mi uzas ĉi tiun malbelan vorton koncerne sportajn konkurojn, ĉar ĝi signifas efektive la efikon de krudaj fortoj unu kontraŭ la alia. Batalo ne konas bonvolemajn konkurantojn, sed nur kontraŭulojn kaj malamikojn, venkintojn kaj venkitojn. Sed ĉi tie oni celas nur rekordojn, certe kun forto, lerteco, persisto kaj nekonsterniteco, sed sen krudeco kaj malamikeco, efektive kun multflanka kulturo kaj ĝentila renkontiĝo. Ĉu povas tiakondiĉe ekzisti venkintoj aŭ venkitoj?

Ĉiuj individuaj preferoj de sporto restas malantaŭ la menciitaj ecoj de efektive altvalora karaktero, kiuj estas pli decidaj kaj influaj por la homa vivo. Ĉar nur sportaj perceptoj kaj per tio akiritaj principoj, akceptitaj kaj alkutimigitaj, eniĝas en ĉiujn sferojn de l' ĉiutaga vivo, ili altrudiĝas senkonscie en ĉiuj situoj kaj tempoj kaj gvidas la juĝon kaj agdecidon.

Post priparolo de la disvastiĝo de l' sporto konstatas la aŭtoro kun ĝojo, ke lastatempe la sporto influas denove la reciprokajn rilatojn inter la popoloj. Li finas per jenaj vortoj:

Sporto estus destinita, krei kaj eduki ne nur novajn popolojn, sed ankaŭ novan, pli noblan generacion.

Tio estas la plej alta morala graveco de l' sporto.

Esp. d-ro Sós-Wien.

Aŭstria Esperanto-Delegitaro

Bisamberg bei Wien, Nr. 248.

Atentu!

Pro teknikaj kaŭzoj **A. E. D.-Konferenco** okazos anstataŭ la 6. dec. nj. **la 10. jan. 1926** en Wien.

Specialaj invitiloj ne estos forsendataj.

Jam nun preparu raportojn ktp. kaj sendu ilin al mia adreso.

Steiner, ĝen. sekr.

Adiaŭa festo por lia Provinciala moŝto P. Mestan.

La 27. okt. la grupo „Angulo esperanta" en Krems aranĝis adiaŭan feston por sia fondinto kaj ĝisnuna estro P. Mestan okaze de lia translokiĝo al Wien. Unue s-inoj Primmer, Heybal kaj Decker, akompanataj de f-ino Mauer per fortepiano, kantis la himnon. Poste la nuna grupestro s-ro Stanke dankis per elkoraj vortoj la adiaŭantan fondinton de la grupo pro liaj senlacaj klopodoj. Stanke esprimis la deziron, ke lia Prov. moŝto baldaŭ revenu al Krems. F-ino Ledl transdonis al lia moŝto rememordonacojn malgrandajn. P. Mestan dankis kortuŝite. Fine f-ino Protiwinsky bonege recitis poemon. St.

Krems,

malgranda urbo, bele situa ĉe la bordo de Donaŭ, ludis ĝis nun nur malgrandan rolon en nia movado. Malgraŭ senlacaj penadoj nia ŝatata s-ano, lia Provinciala moŝto P. Franz Mestan*) unue nur povis kolekti ĉirkaŭ si malgrandan nombron da adeptoj. Sed antaŭ unu monato la viglaj Krems-aj e-istoj komencis grandan varbadon. La rezulto de ĝi estis, ke la urbestro Finanzrat Baran disponigis por kursoj ĉambregon en la reallernejo kaj ties direktoro Illing afable subtenas la movadon. La 22-an okt. s-ro Steiner parolis tie antaŭ 140 geaŭskultantoj. Proksimume 100 personoj sin anoncis por 3 kursoj, kiujn s-ano Steiner gvidas.

Gratulinda estas tiu ĉi sukceso, kiujn niaj pioniroj en Krems tutplene meritas. Gratulon ankaŭ al la fondinto de la grupo kaj ĉiama batalanto por nia movado! St.

*

La 18. okt. nj. f-ino Marta Metzker, la konata tre diligenta sekretariino de E.-societo „Danubio", edziniĝis kun s-ro Friedrich Kohn. Ni gratulas!

---

*) ankaŭ membro de la ŝtata ekzamenkomisiono.

Diservo katolika

okazos la 22. nov. je la 10-a en Minoritenkirche.

E.-Ekspozicio en St. Pölten.

La vigla grupo „Nova Sento" en St. Pölten aranĝis la 26.—28. sept. belan ekspozicion en „Stadtsäle".

La protektoro. deputito de liglanda parlamento por Niederösterreich, urbestro de St. Pölten Hubert Schnofl ne povis partopreni pro urĝa forvojaĝo. Anstataŭis lin vicurbestro, eksdirektoro de burĝlernejo, Franz Peer, kiu en sia parolado ĝuste taksis la valoron de E. kiel interkompreniĝilo krom la gepatra lingvo kaj promesis al la aranĝinta E.-unuiĝo „Nova Sento" plejan subtenon kiel ĝis nun. Fine vicurbestro Peer sciigis la ĉeestantojn, ke la urba estraro kaj la distrikta lernejkonsilantaro de St. Pölten decidis, enkonduki E.-on en la knaban kaj knabinan burĝlernejojn. La instruado komencos la plej venontajn tagojn en la unuaj klasoj kaj daŭros tri jarojn.

En la nomo de Aŭstria Esperanto-Delegitaro dankis la ĝeneralsekretario Steiner la urbestraron pro la ĝisnuna subteno kaj pro la promeso de ties daŭrigo. Plue li esprimis sian ĝojon pri la imitinda enkonduko de E. en la lernejojn.

La malfermon de la ekspozicio ĉeestis inter multaj aliaj s-oj distrikta lernejinspektoro Handl, direktoroj de ambaŭ burĝlernejoj, reprezentanto de gazeto Pfeiffer ktp.

La ekspozicio bone sukcesis.

Kursoj komenciĝis:

Graz-Eggenberg.

20. okt. ĉe socialista junularo „Infanamikoj", gvid. s-ano Hermann.

Graz.

3. nov. ĉe Merkur, societo de komercoficistoj, gvid. s-ano Mader.

Wien.

En „Bohema Klubo E.-ista", XV., Turnerg. 9 (Narodni Dum); gvid. Franc, Panhartek, Kocourek.

Wien-a Akademia Societo E.-ista senespere devis ĝis nun lukti kontraŭ indiferenteco kaj skeptikeco de l' studentaro. Prelegoj ĉe la Universitato kaj varbado ĉiuspeca ne kondukis al celo. Je la fino de la somera semestro estis unumonata kurso ĉe la universitato (proks. 50 part., kiuj restis ĝis la fino).

Oni elektis prez. la meritoplenan pioniron de nia societo, kolegon F. W. Illing, konata verkisto, vicprez. kol. Lempert, sekr. kol. Postl, kas. koleginon Rosenthal. La fervora virina sekso ĝojinde nun jam grandnombre estas reprezentata en la societo. Pluan sukceson al la nova estraro!

Unua Esperanto-Unuiĝo

invitas al paroladoj okazontaj: 20. nov. „La amerika duelo" (s-ro ĉefrevid. Braun), 27. nov. „Od" de barono Reichenbach (s-ro Hofrat inĝ. Hartwich).

Nova grupo.

Katolika popolligo (Katholischer Volksbund) en Graz fondis la 22. okt. Esperanto-sekcion.

Rimarkindaj — Presaĵoj.

Elzasaj Legendoj. Trad. Charlotte Pulvers. Esp. Bibl. Intern. n-ro 28; 2 a eld. (4 a—8 a mil.); 1924; eld. Ellersiek & Borel, Berlin-Dresden; prezo: 0·40 R. M.

„... Elzaso nun havas alian, fremdan registaron, alian oficialan lingvon... Legendoj estas internaciaj; estas do indiferente ĉu la landparto de ilia deveno apartenas nun al ĉi tiu popolo aŭ al tiu; ĉefaĵo estas, ke ili kantu sian ĝojon, sian doloron, sian amon en la koron de sia legantaro." Tion ili faros. Krome pro la simpla stilo rekomendindaj por komencintoj.

W. Smital-Wien.

„Oriento", monata illustr. revuo, eld. de E.-Eldona Kompanio „Oriento" Novij-Gorod, P. O. Box 35, Harbin, Manĝurio, Ĥinujo. Prezo de 1 n-ro kun afranko 1 hindol., 2 ŝil, 1 15 rublo, 1·20 jap. jenoj, 0 50 usona dol. La unua n-ro aperis en julio. Bela revuo enhavanta sur 110 pĝ. kun pli ol 50 interesaj ilustraĵoj artikolojn pri Formosa, Ĥinujo, Japanujo, Koreo kaj Mongolujo (literaturo, socio, etnografio, pedagogio ktp.). Ĉefo de la nova entrepreno estas konata In. Seriŝev.

Kun granda kuraĝo niaj s-anoj entreprenis la eldonon. Mendu tuj almenaŭ 3 n-rojn!

Kiu interesiĝas pri oriento, certe ĝojos pri tiu ĉi revuo, kaj kiu legos ĝin, certe poste interesiĝos pri la oriento. St.

La vivo de liceano: E. Deligny; Joly-Thuilliez, 9 Rue d' Arras, Saint Omer; 1925; prezo: 2 sv. fr. Ŝatantoj de natura instrumaniero ĝojegos. Dekduo da malgrandaj, simplaj, vivecaj lecionoj. En ĉiu kelkaj novaj vortoj kaj el ili formitaj frazoj pri la ĉiutaga vivo prezentataj en demandoj kaj respondoj. Ne konsiderante la strangan uzon de kelkaj vortoj mi opinias min prava nomante tiun ĉi lecionaron bonega helpilo unika por la natura instruo de l' internacia lingvo en lernejanaj rondoj. Nur tiaj lerniloj uzataj de perfekte lingvokapablaj instruantoj fine venkigos vivantan lingvon Esperanto. Dankon kaj gratulon al la aŭtoro! Celkonsciaj E-instruantoj uzu tiun senmodelan verketon! W. Smital.

„Fariĝu Stenografisto"

estas senpaga propagandilo mendebla ĉe P. Flageul, 9 Bd. Voltaire, Issy les Moulineaux, Seine, Francio.

Farmacio kaj Ĥemio. 32 pĝ. gazeto, aperas ĉiusezone ĉe E. grupo en Tojama Farmacia kolegio, Tojama, Japanujo.

VI. Int. Specimenfoiro de Reichenberg, Ĉ.S.R. 15 – 21. IX. 1925. Broŝureto.

Foiro de Frankfurt a. M. 4.—7. X. 1925. Ilustr. broŝuro.

La evoluo de la Leipzig-a foiro de Paul Voss, eld. de la aŭtoro, pritraktas la historion kaj evoluon de la Leipzig-a foiro. Luksa broŝuro kun multaj fotografaĵoj.

Tradukekzercoj.

Redakt. Walter Smital-Wien.

Nr. 2: Tierpsychologische Beobachtungen im Schönbrunner Tiergarten. (I.)

Als „Bimpf", der vom Grafen Khevenhüller gefangene und der Menagerie gespendete vierjährige afrikanische Elefant, in Schönbrunn ankam, war alles gespannt, wie sich „Mädi", die nunmehr neunzehnjährige Tochter der „Schönbrunner Pepi", die jahrelang die Gesellschaft von Artgenossen zu entbehren hatte, zu dem neuen Ankömmling stellen werde. „Bimpf" schritt mit erhobenem Rüsselchen auf das „Mädi" zu. Dieses stutzte zuerst; als er aber näher kam, nahm es Reißaus und floh mit allen Merkmalen des Schreckens vor dem kleinen Tiere. Erst spät haben sich die beiden angefreundet. Nun kam in diesem Sommer der im Tauschwege erworbene vierjährige sumatranische Elefant nach Schönbrunn, der aus traditionellen Gründen „Pepi" getauft wurde. Während sich „Mädi" mit ihm rasch befreundete, lehnt „Bimpf" noch jede Freundschaftsbezeugung seines beinahe gleichalterigen Artgenossen nachdrücklich in der drolligsten Weise ab. Er behält „Pepi", der darob eine stoische Ruhe bewahrt, ständig im Auge. Kommt zufälligerweise doch eine Annäherung auf einige Schritte zustande, dreht ihm „Bimpf" flugs die Kehrseite zu. Läßt er einmal die gewohnte Vorsicht außeracht, so daß es „Pepi" gelingt, ihn mit dem Rüsselchen behutsam liebkosend zu berühren, dann trompetet er darauf los, als wenn er auf dem Spieße stäke und flüchtet, soweit es die Ausdehnung des Geheges gestattet.

Enigmoj.

I.

A	A	A	A	A
A	A	A	A	A
A	A	C	E	E
E	E	E	E	E
E	E	Ĉ	I	I
I	K	K	K	K
K	L	L	M	M
N	N	N	N	N
N	N	O	O	O
R	R	R	R	R
S	S	S	S	Ŝ
T	T	T	T	T
U	U	U	Z	Z

El tiuj ĉi literoj formu vortojn de jena signifo: horizontale:

1. vico: meblo*)
2. „ Anĝo de
3. „ amerika riĉulo
4. „ opero
5. „ ago de aranĝanto*)
6. „ paradizo de antikvaj Grekoj*)
7. „ monto en Afriko
8. „ urbo en SHS
9. „ malliberigo*)
10. „ insulo sude de Italio
11. „ senfina ekskurso*)
12. „ en neniu loko
13. „ maro*)

*) signifas, ke mankas la finaĵo.

La unua vertikala vico: grava poresperanta okazintaĵo en Aŭstrio.

La lasta vertikala vico: devizo por la aŭstriaj esperantistoj. Altrichter.

II.

1 2 3 2 kartludo ĝin bezonas
2 1 2 3 estas mor' sovaĝa
2 3 2 1 signitas ĝenerale ĉion

III.

Ŝanĝu la unuan literon de la vorto trovota kaj estiĝos vortoj de jena signifo:

1. infano
2. longa kava objekto
3. sento de necerteco
4. sub la ĉielo
5. postresto de ruino
6. geometria formo

Uli.

Solvo de l' krucvortenigmo el n-o 10.

Horiz.: 1. naŭ, 2. Trompeter, 3. tri, 4. er, 5. trovi, 6. Natal, 7. er, 8. ve, 9. dramo, 10. Gades, 11. emo, 12. tia, 13. us, 14. oro, 15. palmo, 16. uro, 17. Ido, 18. termito, 19. Iza, 20. oko, 21. Sir, 22. one, 23. bo, 24. Perg, 25. Trotta, 26. ol, 27. Samoa, 28. raso, 29. la, 30. Kulm, 31. baroko, 32. obl, 33. nie, 34. oni, 35. dis, 36. aer, 37. ontolog, 38. mam, 39. Utu, 40. orden, 41. do, 42. AED, 43. ok, 44. Iglau, 45. azaro, 46. ne, 47. Leder, 48. idolo, 49. ar, 50. eks, 51. Grabowski, 52. tro.

Vert.: 1. nervo, 2. tramo, 5. tre, 13. Urano, 15. pergameno, 16. uzo, 18. Tirolio, 20. obolo, 21. Semun, 24. pak, 35. dat, 39. Udine, 49. ar, 53. ar, 54. Romo, 55. ovo, 56. mi, 57. en, 58. tag, 59. etat, 60. radio, 61. re, 62. iriso, 63. eriko, 64. odo, 65. abato, 66. Lea, 67. ek, 68. agl, 69. keleg, 70. kadr, 71. UEA, 72. ezok, 73. Itali, 74. oro, 75. himno, 76. Ikaro, 77. Elias, 78. tra, 79. led, 80. Oder, 81. ĉar, 82. Salm, 83. ami, 84. Otto, 85. Rea, 86. Roon, 87. Ostrong, 88. ataki, 89. aso.

Wo trifft man Esperantisten und erhält Auskünfte?

Kie oni renkontas E.-istojn kaj ricevas informojn?

So = d, Mo = l, Di = m, Mi = me, Do = ĵ, Fr = v, Sa = s.

Graz.

Esp. Verein für Steiermark, Bürggasse 16. Gasthof (gastejo) „Altes Stadttheater", Di (m) 20—23 h.

Klosterneuburg.

Esp.-Servo, Martinstr. 59—61, gastejo Ebner (Leiter: Ebner u. Leidlmayr) täglich (ĉiutage).

Korneuburg.

E.-Verein, Mi (me), Knabenschule 20 h.

St. Pölten.

E societo „Nova sento", Café Linzerstr. 32; F (v), 20—22 h.

Wien.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, I., Kleeblattgasse 7, Mi (me) 17—19 h.

I. Wiener Esp.-Verein, I., Weihburggasse 12, (Kasino) Fr (v) 19·30 h.

Esp. laboristaro kristana de Aŭstrio, Esp.-Verein der christl. Angestellten und Arbeiterschaft Oesterreichs, I., Bräunerstraße 7, I. rechts (dekstre), Do (ĵ) 18—21 h Privatlokal (privata ejo).

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, III., Rasumofskygasse 7 (Café Zartl), Di (m), 19—21 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, Sa (s) 18·30—20·30 h (den ersten Monatssamstag: Besuch der Delegitaro — la unuan sab. de l' monato en delegitaro.)

„Konkordo", V., Margaretenplatz 4 (Terrassencafé), Do (ĵ) 19—22 h.

Esp.-Societo „Danubio", Café Egkher, VII., Lerchenfelderstraße 23, Mo (l) 19 h bis 23 h.

Akademischer Esperanto-Verein, I., Universität. Zusammenkunft wie (kunvenejo la sama kiel) „Danubio".

Freie Esperantistische Arbeitsgemeinschaft. Auskünfte (Informoj), wie „Danubio". Täglich (ĉiutage) 18—19·30 h.

Esp.-Bildungsverein „Supren". VII., Kaiserstraße 121, Café. Fr (v) 18—21 h.

Polizei-Esp.-Verein, VII., Karl Schweighofergasse 3, Do (ĵ) 18 h.

Esp.-Unio Fervojista XIV., Avedikstr. 2, Di (m) 19 h.

Esp. societo „Fideleco", Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudg. 1, Di (m) 16—19 h.

Empfehlenswerte Firmen.

Rekomendindaj firmoj.

E. signifas, ke oni parolas E.-on.

Graz.

Café = kafejo:
„Post", I. Haring, Neutorgasse.

Korneuburg.

Bäckerei = bakejo:
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.

Buch-, Papier-, Modew. = libroj, paper- kaj modaĵoj:
Johann Lederer, Hauptpl.

Delikatessen, Spezerei, Modew. = delikatmanĝaĵoj, spicoj, modaĵoj:
Franz Schupitta, Eisenbahng. 4.

Gemischtwaren = Diversaĵoj:
Alois Cisař, Bisambergerstr. 21.

St. Pölten.

Bettw., Teppiche, Möbel = litaĵoj, tapiŝoj, mebloj:
Rudolf Leiner, Rathauspl. 7—8.

Buchhandlung = librovendejo:
J. G. Sydy (Ludwig Schubert), Herrenpl. 1.

Eisenwaren und Kohlen = feraĵoj kaj karbo:
Franz Benedikt, Wienerstr.

Gasthaus = gastejo:
Engelbert Langmann, Fuhrmannsgasse 15, tel. 407.

Modesalon = Modaĵvendejo:
K. Adametz-Bianchini.

Musikinstrumente = muzikiloj:
Emanuel Schimek, Herrenpl. 5.

Opt. u. photogr. Art. = optikaĵoj kaj fotogr. artikloj:
Marie Motz, Kremserg. 16.

Uhrmacher und Juwelier = horloĝisto kaj juvelisto:
Hermann Löw, Rathausg.

Vordruck, Ajour., Pliss. usf. = preparo kaj kompletigo de virin. manlaboraĵoj:
Johanna Krenn, Wienerstr. 51.

Wäsche und Wirkwaren = tol- kaj maŝintrikaĵoj:
L. Breuer's Nachf., Rathausg. 2.
Karl Schenk, Wienerstr. 25.

Werkstätte f. Photogr. u. Reklame = laborejo por fotogr. kaj reklamiloj:
Theo Füchsel, Heßg. 6; tel. int. 71.

Wollwaren, Strickerei u. Niederlage = lanaĵoj, trikejo kaj vendejo:
Paula Kotoul, Marktg. 3.

Wien.

Buch-, Kunst- u. Musikalienhandlung = vendejo de libroj, artaĵoj kaj muzikaĵoj:
Friedrich Scheibl (E), IX., Sobieskigasse 42, täglich (ĉiutage) 16—18 h. Tel. 17705.

Drogerie = drogvendejo:
„Anker" (E), Mag. A. Taussig, IV., Wiedner Hauptstraße 24.

Schreibmaschinen = skribmaŝinoj:
Edmund Igel, II., Praterstr. 41, Tel. 46501.

Speisehaus = manĝejo:
Stadttheaterkeller, VIII., Daungasse 1.

Sportausrüstung = sportaĵoj:
Zidek & Wagner, I., Seilerstätte 7, Tel. 73330.

Staubfreies Kehrmittel = Balarimedo polvonfiksa:
J. Weininger (E), VII., Neubaugasse 32.

Zuckerwaren = sukeraĵisto:
Andreas Deistler, VII., Schottenfeldg. 91.
Franz Prohaska, XII., Premlechnergasse 21.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Korneuburg, Postfach 26. — Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.